

BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

1-a numero

januaro-marto 1974

Motto:

Tuta cento da plej grandaj
elpensoj ne faros en vivo de la homaro
tiel grandan kaj bonfaran revolucion,
kian faros enkonduko de Lingvo
Internacia.

Urugvaja Esp.soc.

NIA DEVO ESTU: PACIENCE LABORI!

Esperanto apartenu al ĉiu homo, kiu volas ĝin lerni. Sed ĝi estu deviga lingvo por tiuj, kiuj volas internacie labori: sciencistoj, diplomatoj, ekonomoj, redaktoroj k.t.p. Ĝi estu oficiala lingvo en iliaj internaciaj kunvenoj.

Ankaŭ internacia trafiko nepre bezonas internacian lingvon. Kia facila afero estus, se oni povus legi trajnohorarojn en internacia lingvo!

Kial malgrandaj nacioj devas suferi sub lingva hegemonio de grandaj nacioj? Ĉu ne estus pli demokrate, ke dum kunvenoj estu uzata neŭtrala lingvo? Kial membro de malgranda nacio devas por tiu celo lerni nacian lingvon de tiu, kies lingvo estas uzata kiel laborlingvo? Pravas Araboj, kiam ili venis kun postuloj ke la araba lingvo estu ankaŭ laborlingvo ĉe laborkunvenoj de UNO kaj Unesko. Kaj tian postulon rajtas fari ĉiu nacio. Kun neŭtrala internacia lingvo Esperanto povas solvi la problemon.

En Praha komenciĝis novaj E-kursoj kaj laŭdinda estas intereso de junaj homoj, kiuj la kursojn vizitas. Estas nun necese pacience labori, ne nur kun komencantoj, sed ankaŭ kun tiuj, kiuj volas progresi. Ni bone pensu pri tiu ĉi afero. Modeloj por ni estu bulgaraj, hungaraj kaj polaj esperantistoj.

Ant. Slanina

PACO

Senescepte ĉiuj volas Pacon;
sed la lingvoj tiom diferencas,
ke la unuj vidas nur minacon,
kie duaj bonon ekintencas.

Paco, Paco! Kia celo kaj sopir',
kaj deziro kaj aspir'!
Via regno disvastiĝus flame,
se la homoj vin prononcus same!

(Fragmento el poemo "Paco" de R. Schwarz)

Klubaj sciigoj

P o k l a d n í z p r á v a

S radostí konstatujeme, že přes polovinu našich členů splnilo svoji členskou povinnost již do konce roku 1973 zaplacením svého členského příspěvku klubu i svazu na rok 1974.

Členské příspěvky na rok 1974 zůstávají nezměněny.

Kategorie	A (výděleč. činní a důchodci s příjmem 1000,- Kčs a více):	Kčs 68,-
	B důchodci s příjmem pod 1000,- Kčs	Kčs 44,-
	C studující (bez vlastního příjmu)	Kčs 34,-
	D (podporující členové svazu - nejméně	Kčs 100,-
	E (rodinní příslušníci)	Kčs 20,-
	F (přispívající členové bez nároku na Starto)	Kčs 30,-

Nově se hlásící členové platí Kčs 10,- navíc jako jednorázové zápisné na legitimaci svazu. Podotýkáme, že každý člen klubu musí být i členem svazu! V členském příspěvku kategorií A, B, C, D je zahrnuto předplatné na svazový časopis Starto.

Prosíme - nepřehlédněte !!!

S politováním opět konstatujeme, že mnozí naši členové, mezi nimi dlouholetí a kdysi i aktivní, dosud nezaplatili svůj členský příspěvek za loňský rok 1973 i za léta předešlá a složenky jim zasláné nechali bez povšimnutí. Tentokrát naposledy ještě těmto dlužícím členům posíláme klubovní časopis a přikládáme složenky. Žádáme je, v případě, že už nemají zájem o naše esperantské hnutí, aby nám toto číslo vrátili s poznámkou: "N e p ř i j í m á m".

Přihlásilo se nám také několik příznivců se zaplacením dobrovolných příspěvků na tiskový fond, z čehož máme pochopitelně radost. Těšíme se z jejich zájmu, který projeví o náš klubovní časopis Bulteno, který jim bude pravidelně zasílán.

Anna Bárochová, pokladní EKP

Dary na tiskový fond.

200,- Kčs RNDr Vlastislav Zázvorka, Praha – 50,- Kčs Jan Kašpárek, Nížkov – 39,- Kčs Marie Čejnarová, Prof. Ing. Josef Kochman, Bedř. Řeháčková, Dr. Vladimír Čechelín, Jaromír Vrkoslav, Oldřich Kníchal, MUDr. Václava Dušková, Jaroslav Mařík, Luboš Šanda, Lubomír Jakl, manželé Damaškovi a Karel Vrchovecký, všichni z Prahy, Olga Ungerová z Neratovic – 30,- Kčs MUDr. Josef Černý, Most, Jan Kafka., Perštejn Nn/Ohří, Božena Metznerová, Bystřany, Josef Vítek, Mělník – 25,- Kčs Josef Doležal, Petrovice, 22,- Kčs Magda Pelcová, Červený-Kostelec, Karel Zahradník, Praha – 20,- Kčs Miroslav Žouželka, Praha, Alois Burkot, Gottwaldov, Stanislav Werner, Letohrad, Jiří Rada, Most, Anna Taitlová, Karlovy Vary, Jiřina Kovářová, Humpolec, Mir. Smyčka, Ústí n/Lab., Anna Grauerová, Krnov, Berthold Guttmann, Dubí u Teplic, MVDr. Zdeněk Křupka za esper. klub v Kolíně, Mir. Hromas, Hradec Král., Záv. klub ROH Přerov. stroj. Přerov, Dům kultury ROH pracujících, střed. Vítkovice, O.Vítkovice, – 12,- Kčs prof. Dr. Rudolf Horský, Vladimír Kalivoda, manželé Řihoškovi, manželé Šperlingovi, manželé Štifterovi, manželé Řiháčkovi, Ing. Zdeněk Dvořák, Praha, Jos. Maryška, Čelákovice, – 11,- Kčs Jarmila Havlíková, Praha – 10,- Kčs Marie Bartovská, Frýdek-Místek, MUDr. Josef Hradil, Mnichovo Hradiště, Vlastimil Blažek za esper. kroužek v Olomouci, Jan Janda, Kolín – 6,- Kčs Václav Lorenz, Fr. Welterová, Anežka Prokúpková, Václav Rubeš, Marie Patolanová, Marie Hastermanová, Marie Švehlová, Oldřich Stehlík, Josef Havel, St. Žirovnická, Jana Matušková, Frant. Brandejs, Praha a Josef Chvosta, Poděbrady.

Další dary:

104,- Kčs arch. Jos. Drlík – 100,- Kčs Ota Ginz, Izraelo, Jaroslav Tomčík (z příjmu za kurs) – 32,- Kčs Marie Cvalínová, Praha – 56,-Kčs Anna Bursová, Praha – 50,-Kčs Božena Sklenčková, Praha – 30,- Kčs Marie Sylva Světlíková, Praha – 32,- Kčs Dr. Ing. Václav Svátek, Praha – 25,- Kčs Frant. Blažková, Pardubice – 16,- Kčs Ing. Faltejsek, Praha – 10,-Kčs Oldřich Bartoň, Hronov – 11,-Kčs Dolfa Bartošík, Praha – 12,-Kčs manželé Nývltovi, Praha – 6,-Kčs Ota Sklenčka, Praha a Marie Neznalová, Praha,

Všem dárcům upřímně děkujeme!

Anna Bárochová

x-x-x- x-x

PROGRAMOJ DE LA KLUBAJ VESPEROJ:

Januaro

1.	–	–
8.	–	–
15.	A. Hejnová	Variaĵoj
22.	L. Kynčl	Raparto pri E-renkontiĝo en Budapeŝto
29.	La klubanoj	Libera tribunano

Februaro

5.	Jar. Tomčík	Pri 1-a UK en Bulonjo sur Maro
12.	Jar. Mařík	E en la "Tria Regno" (historiaĵo)
19.	L. Kynčl	Variaĵoj en la naturo
26.	Arch. J. Drlík	Februaraj okazintaĵoj

Marto

5.	Ant. Slanina	Vesto faras homon
12.	La klubanoj	Libera tribunano
19.	Dolfa Bartošík	La floranta Nederlando (diapozitivaj)
26.	Dr. Prof. R. Horský	La evoluo de sociala kaj paca pensado de J. A. Komenský

Aprilo

2.	Ing. Felix	Pri aprilo
9.	A. Hejnová	Pri la vivo kaj laboro de Dr. Schweitzer
16.		J a r k u n v e n o
23.	Dr. Sáva Heřman	La lingvo kaj la pensado
30.	Ĉ i u j . . .	Postaprilaj dialogoj

x-x-x-x-x

Niaj jubildantoj:

La 5-an de februaro atingis 65 jarojn nia prezidanto arkitekto Josef D r l í k . Ni gratulas kaj deziras ankoraŭ plurajn 65 jarojn!

La 29-an de marto rememoros sian 50-an naskiĝtagon nia senlaca sveda gamideanino Anna-Lisa A h l r é n el Stokholmo, nia ofta gastino – kvazaŭ klubanino. Ni kore gratulas kaj deziras al ŝi sanon kaj multajn vojaĝojn al nia lando.

La 27-an de aprilo nia samideano Jaroslav T o m č í k farigos 65 jara jubileulo. Ni deziras multan sanon kaj energion.

La 23-an de majo festos nia kasistino Anna Bárochová 80jara jubileon. Ni kore gratulas al nia senlaca kaj oferema samideanino kaj deziras al ŝi firman sanon, kaj ankoraŭ longan restadon inter ni. Ŝia laboro por Esperanto estu modelo por ĉiu esperantisto!

Laŭreatoj internaj

La progresemaĵoj kaj pacamaĵoj esperantistoj en la mondo, festas ĉi-jare la dudekan datrevenon de la fondiĝo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).

La festaj aranĝoj de tiu ĉi bela jubileo kulminis ĉe la VI-a Ĝenerala Konferenco de MEM, okazinta komence de aŭgusto 1973 en Beogrado.

Tie montriĝis, ke dum la pasintaj du jardekoj MEM atingis atentindajn laborrezultojn en la intereso de la monda paco kaj progreso, batalante senrezerve kontraŭ ĉiuj maljustaj militoj, imperiismo kaj militarismo.

Pro sia celkonscia kaj utila agado pere de la Internacia Lingvo Esperanto, gajnis en la vicoj de l' tutmonda esperantistaro kaj ankaŭ en la okuloj de la cetera publiko renomon kaj respekton. Ĝi fariĝis membro kaj kunlaboranto de Tutmonda Packonsilantaro kaj kutime partoprenas en gravaj internaciaj eventoj, organizataj de tiu ĉi kaj de pluraj aliaj organizaĵoj. Unu el la lastaj tiuflankaj okazintaĵoj estis simple la Oktobra Monda Packongreso en Moskvo, al kies preparo kaj partopreno estis invitita MEM kun sia sesmembra delegitaro.

La Internacia Komitato de MEM okaze de la dirita jubileo aprezis kaj alte pritaksis la ofereman kaj senprofitan aktivadon de de tiuj esperantistoj-adeptoj de la noblaj ideoj de MEM, kiuj pleje meritiĝis pri la ĝisnunaj atinfaĵoj sur tiu ĉi kampo kaj aljuĝis al ili Honor-Insigonojn de MEM kun Diplomoj kaj la titolo Laŭreato.

Ni estas feliĉaj, ke inter la honorigitoj, al kiuj estis, laŭ la rekomendo de la Ĉeĥoslovaka MEM-sekcio kaj de la Estraro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aljuĝitaj la menciitaj ordenoj, estas ankaŭ jenaj kvin longjaraj kaj meritplenaj aktivuloj de la Esperantista Klubo-loka grupo de ĈEA en Praha: Anna Bárochová, Milada Josková, Ing. Frant. Sviták, Jaroslav Mařík kaj Václav Lorenz.

Al la nomitaj laŭreatoj apartenas ne nur sincera gratulo de ni ĉiuj, sed ankaŭ varma danko pro la oferema kaj ofte eĉ abnegacia laboro, kiun ili dum longaj jaroj dediĉis al sublimaj ideoj de Esperanto, monda paco, interkompreniĝo kaj homa progreso.

T. Balda

X-X-X-X-X

Tomáš Balda ne plu viva:

Trafite de koratako, la 8-an de decembro 1973 subite mortis nia membro Tomáš Balda.

Li estis varbita por Esperanto en 1945 de s-ino J. Šupichová. Decidinte nuligi sian metiejon en strato Malá Štěpánská nro 7, li transdonis en 1946 du ĉambrojn al la E-Asocio, kiu tie havis dum ses jaroj sian sidejon kaj akceptis T. Balda kaj poste ankaŭ lian edzinon kiel siajn oficistojn. Lia inteligenteco helpis lin baldaŭ ekregi tre bone la lingvon. En niaj klubkunvenoj li plurfoje prezentis siajn programojn.

En 1952, kiam la Asocio devis likvidiĝi, ĝia komitato elektis lin estro de la likvida komisiono. Post tiu dato T. Balda ne partoprenis la E-movadon, sed senlace aktivis en funkcioj politikaj kaj en la porpaca movado. Komence de la sesdekaj jaroj, trafite de la unua kor-infarkto kaj multe pripensante dum longa kuŝado en hospitalo, li recerbumis pri sia iama aktivado en la E-movado kaj decidiĝis – kiel li konfesis al mi elserĉinte min post multaj jaroj – reveni en la movadon. De tiu tempo li estis sekretario de Ĉeĥoslovaka E-Komitato, ĝenerala sekretario de la Mondpaca Esperantista Movado, prezidanto de la ĉs. MEM-sekcio kaj estrarano de ĈEA, estrarano de la Ĉeĥa Packonsilantaro. Li fariĝis laŭreato de la Ĉeĥoslovaka Pacpremio kaj de la Honor-Insigono "MEM 1953-1973".

Li forpasis en la tago, en kiu li estis transdonota, en solena kunsido de ĈEA, Honorinsigonojn de MEM al ĉeĥaj meritplenaj batalantoj por la monda paco kaj progreso pere de Internacia Lingvo, el kiuj kelkaj estas niaj membroj. En tiu transdonado anstataŭis lin la ĉeestanta N. Aleksiev.

Tomáš Balda fidinde plenumadis ĉiun el siajn funkciojn kaj taskojn. Li estis laborema, sincera, honesta, kaj, kio lin ankaŭ karakterizas.

La lastan adiaŭon, eldiritan de J. Vítek, prezidanto de ĈEA, partoprenis multaj esperantistoj. Ni konservos lin longe en nia memoro.

Jar. Mařík

Niaj forpasintoj

Ant. Nový, Suchdol (nekonata dato)
František Bis, Praha – 27.7.1973
Tomáš Balda, Řevnice – 8.12.1973
Marie Bulisová, Praha – 8.12.1973
Marie Rajnyšová, Praha – 4.1.1974
Anežka Prokůpková, Praha – 17.1.1974

X-X-X-X-X

Interesaĵoj

Oficejo de ĈEA troviĝas nun en Praha 1, strato Jilská n-ro 10. En la sama ejo estas ankaŭ E-biblioteko "Jaroslav Šustr" de klubo en Praha. Informojn petu de Al. Zmeškal, bibliotekisto, ĉe la sama adreso.

Kurso por komencantoj malfermiĝis la 16-an de januaro 1974, en ROH-lernejo de ĈSD en stacidomo Praha-Smíchov. Laŭ sia nova metodo "INTER" instruas s-ano Slanina. Partoprenas 26 gelernantoj. Lecionoj okazas ĉiumerkrede de la 18-a ĝis 20-a horo.

Klub esperantistů v Liberci – místní skupina Českého esperantského svazu pořádá ve dnech 4. - 18. srpna 1974 II. LETNÍ KOLEJ ESPERANTA.

V programu jsou tyto kursy:

A - pro začátečníky D - kurs pro budoucí učitele
B - pro pokročilejší E - řečnický kurs
C - konverzační kurs

Kurs A bude veden přímou metodou. Ubytování bude ve studentské koleji ve třílůžkových pokojích. Stravování buď přímo v koleji, nebo v restauraci (není zahrnuto v ceně). Cena je stanovena na 650,- Kčs (ubytování, kursové a jeden autobusový výlet do okolí). Žádáme, abyste nám svoji přihlášku zaslali nejpozději do 15. dubna 1974. Zároveň s přihláškou poukažte zálohu 300,- Kčs na náš účet u České státní spořitelny v Liberci (na složenku napište SBČS Liberec, pro účet č. 57-3004-5. Příjemce: Česká státní spořitelna Liberec, účet č. 520513. Bez zaslání zálohy nebude na přihlášku brán zřetel - v případě, že se koleje nebudete moci zúčastnit, sežeňte si za sebe náhradu. Objednané ubytování musíme zaplatit i v případě, že místo neobsadíme, takže ze zaslání zálohy bychom vám mohli vrátit pouze 50%. Nezapomeňte se přihlásit včas, počet účastníků je omezen na 100 osob.

Těšíme se na shledanou v Liberci - krásném městě mezi Jizerskými a Lužickými horami.

Letní esperantský tábor v Lančově má tento program:

seminář: 7.-13.7.1974 – I.běh: 14.-27.7.1974 – II. běh: 28.7. - 10.8.1974

Podmínky pro členy svazu:

do 15.1.1974 ...	Kčs 360,-
15.3.1974 ...	Kčs 420,-
15.6.1974 ...	Kčs 440,-
po tomto datu ...	Kčs 460,-

Zálohu Kčs 200,- a přihlášky zašlete vedoucímu LET s. P. Sittauerovi, Znojemská 1128, 674 01 Třebíč.

Náš kroužek letos upouští od organizování hromadné účasti a ponechává zájemcům vlastní výběr možností.

La legantoj skribas

Klarigo de s-ro Dolfa Bartošík

En la lasta n-ro de nia Bulteno aperis informo, ke nia klubano partoprenis per sia E-kolekto en la filatelia ekspozicio en Liberec. Tiu sciigo estis erara kaj nekompleta. Mi donas nun la ĝustan informon.

La Asocio de ĉefaj filatelistoj (SČF) rekomendis la bone konatan kolekton de sam. Bartošík al la Tutmonda filatelia ekspozicio en Poznan aranĝite tie okaze de la 500-jara naskiĝ-datreveno de la pola astronomo M. Kopernik. La kolekto, kiu per varia filatela materialo montras preskaŭ la tutmonda oficialan uzon de nia lingvo en poŝtaj rilatoj, estis bone akceptita de la internacia jurio kaj distingita per granda orumita medalo, diplomo kaj kroma honorpremio: metala reliefa bildo de Kopernik. Oni samtempe rekomendis, ke la sama kolekto estu ekspoziciata venontjare en la Internacia filatela ekspozicio en Stokholmo.

Pasis nur kelkaj semajnoj kaj la kolekto de sam. Bartošík aperis en la Tutŝtata filatela ekspozicio en Sezimovo Ústí. Ankaŭ tie ĝi estis bone akceptita kaj denove distingita per granda orumita medalo kaj diplomo. Krom tio s. Bartošík ricevis apartan premion por la plej bona laŭtema kolekto en la ekspozicio, grandan kristalvazon kun kun orlittere skribita dediĉo de la donacinto, la loka Entreprena klubo ROH – Sezimovo Ústí. Kaj la plej efika propagando por nia lingvo okazis la 11-an de oktobro 1973, kiam la dufoje alte premiita E-kolekto de nia klubano estis montrita en la vespera unua programo de la televido.

X-X-X-X-X-X

La dialogo inter redaktoro kaj raportisto

RNDr. J. Kavka: Ho ve, kara redaktoro! Mi ĝemas el meze de bandaĝoj. En mia raporto "Polaj geologoj en Prago" vi ĉie (kvinloke) eloperaciis la esperantlingvan nomon de nia amata metropolo kaj transplantis la nomon originalan. Mi cerbumas, kial vi entreprenis tiun ĉi ĥirurgie netan sanigan intervenon. Ĉu por steriligi min, poŝatlasulon.

Redaktoro: Kara amiko, la ĥirurgo ne estis mi, sed la tajpistino. Skribante sur stencilon, ŝi eraris skribante anstataŭ Prago – Praha. Kaj ĉar ŝi ne posedis pluan stencilon, ŝi devis jam uzi nur Praha.

X-X-X-X-X-X

Ĉu kredinda aŭ bedaŭrinda?

Mi estis en kluba kunveno kaj iris hejmen. Surstrate venis al mi juna paro – ŝi kaj li – alparolis min germane kaj demandis pri la placo de Karolo.

Mi klarigis kaj montris al ili direkton. Sed ili ankoraŭ staris. Kial? - mi pensis. Do mi aldonis. Ĉu vi ne ...? Kaj ce tiu nefinita frazo mi konstatis, ke mi konstante parolas esperante kaj ili ne povis kompreni.

Do, mi komencis malrapide paroli germane, por denove ne intermiksi esperanton, senkulpigis min, ke mi venas el Esperanta klubo kaj demandis: Certe vi scias, kio estas Esperanto.

"Jes, jes, la k a f o ĝi estas."

Surprizita de neatendita respondo mi diris, ke mi treege miras, ke junaj homoj ne scias, ke Esperanto estas internacia lingvo kaj ĥuste en germanaj landoj multe disvastigita.

Sed ili ambaŭ diris: "Mi neniam aŭdis pri ĝi."

Estinte sola, mi malgajiĝis parolante al mi mem: "Nu, vidu, post tiom da laboro, tiom da penado en la tuta mondo, mi devas aŭdi tian eksternorman respondon." Poste mi opiniis. "Ĉe ni estas kafo ekspreso, tio eble erarigis ilin, sed tamen ...

A. Hejnová

Beletrio

L i a m i s l a v i v o n

Baldaŭ, jam post kelkaj monatoj, en aŭgusto 1974, rememoros la ĉeĥa esperantistaro kaj multaj gesamideanoj en eksterlando, la neĝisvivitajn 70 jarojn de la eminenta ĉeĥa esperantisto, fakinstruisto kaj elstara pedagogo, František Omelka, la aŭtoro de la fama libro "LA ALASKA STAFETO" kaj de kelkaj aliaj rakontoj.

Krom miloj da liaj iamaj gelernantoj rememoros lin ankaŭ multaj profesiaj kunlaborintoj, kiuj kun respekto kaj admiro sekvis lian modelan laboron sur kampo pedagogia kaj ĝenerale eduka.

Kiel lia kolego en lernejo kaj multjara intima amiko, mi volas nun koncize skribi pri lia varma rilato al Esperanto, kiun li per siaj tuta koro kaj sentoj ekamis. Por li la konatiĝo kun Esperanto signifis profundan ŝanĝon en lia laborplena vivo.

Denaske li estis homo gaja kaj sprita, bonulo kun infaneca koro, klera admirinto de ĉio bela kaj nobla, revinto pri tutmonda paco, idealisto, aminta la vivon. Ĝiajn negativajn aspektojn en la socio li ĉiam klopodis forigi per celkonscia edukado en lernejo, lia profesia laborejo, sed ankaŭ ekster ĝiaj muroj, en la publiko. Tuj, kiam li en tridekaj jaroj esperantiĝis kaj ekkonis la praktikan valoron de la Internacia lingvo, li decidiĝis dediĉi parton de sia verkista talento ankaŭ al verkado en Esperanto. Ĝis tiam li verkis nur en sia gepatra ĉeĥa lingvo, plejparte rakontojn el la vivo de kamparana junularo kun celo instigi la junajn legantojn al agado laŭ modeloj de li priskribitaj herojoj.

De la momento, kiam František Omelka ekregis la novan lingvon, li tuj komencis verki similajn rakontojn ankaŭ en Esperanto. Tiutempe en pluraj ĉeĥaj gazetoj aperadis liaj interesaj rakontoj kaj artikoloj pri kesperanto. Sed Omelka ekinteresiĝis ankaŭ pri tradukado. Li tradukis kaj publikigis en la ĉeĥa lingvo verkojn de Lidja Zamenhof, Selma Lagerlöf, J. R. Scherer kaj aliaj konataj E-publicistoj. Preskaŭ kun ĉiuj li estis en skriba kontakto. Vigle li aktivis en la lokaj, de li fonditaj E-klubo kaj rondetoj, gvidis kursojn publikajn kaj en lernejoj. Ofte prelegis kaj organizis propagandajn prelegojn por eksterlandaj esperantistoj, kiuj en antaŭmilitaj jaroj vizitis Ĉeĥoslovakion.



Sed la internacian famon kaj reputacion li akiris per sia verko "LA ALASKA STAFETO", tradukita poste el Esperanto en kelkajn lingvojn.

Tiu modesta, delikatsente verkita rakonto estis dediĉita al la junularo. Sed pro sia profunda humeneca ideo, plena de homamo kaj sinofera braveco, ĝi trovis ĉiuaĝajn legantojn en multaj landoj. Libroforme ĝi aperis eĉ sur Islando en traduko de Stefan Sigurdsson kaj poparte, oni ĝin laŭtlegis kun granda sukceso ankaŭ en radio de Reykjavik.

Pri la libro aperis multaj laŭdindaj recenzoj en la tutmonda gazetaro, ne nur esperanta. Tian sukceson la aŭtoro mem ne atendis.

František Omelka forpasis en junio 1960. Tre domaĝe, ke pro la neatendita morto li ne povis efektiviĝi pli el siaj literaturaj planoj.

Kiel funda scianto de la gepatra lingvo kaj rekonita ĉeĥa pedagogia kaj porinfana verkisto, František Omelka elplugis profundan sulkon sur la kampo de moderna, progresema pedagogio. Sed oni povas diri, ke ekkono de Esperanto grave plilarĝigis liajn kulturajn horizontojn. Foje li skribis al mi: "Nenio alia malfermis al mi la mondon tiom, kiom Esperanto, tiu genie kreita lingvo!" Jes, la ideo de komuna lingvo dekomence ravis lin. Tial krom la plenumado de ĉiutagaj devoj en sia profesio, li ĝoje kaj entuziasme partoprenis en la E-movado.

Per verkado li kulturis la lingvon, ĉar li estis konvinkita, ke Esperanto servas al la tutmonda paca kunvivado kaj pli feliĉa vivo entute.

Dolfa Bartošík

Memore al Zamenhof.

Monato decembro estas ĉiujara rememoro de la naskiĝtago de nia majstro L. L. Zamenhof. Li estas sufiĉe konata en la mondo kaj el multaj flankoj priskribata de diversaj aŭtoroj kaj konatoj de lia vivo; inter ili apartenas ankaŭ lia frato Dr. Felix Zamenhof, kiu priskribas la familian medion, plejparte rilatan al Ludoviko. Ĉi tiu eltranĉaĵo pruvas, ke Ludoviko estis amata filo de siaj gepatroj.

"Ludoviko estis favorato de la gepatroj", diras dr. Felix Zamenhof, "mi supozas, ke li neniam kaj neniel estis riproĉata de ili. Se li nur havus bonan apetiton, li ricevdus duoblan tagmanĝon. Kion mi ofte aŭdis, Ludoviko estis ĉiam malforta, pala kaj tre impresema knabo. Li estis tre ordema kaj obeema. Tre karakteriza estas por li la respondo, kiun li, apenaŭ kelkjara knabo, donis al la patro.

- Ĉu vi volas iri en lernejon? - demandis la patro.

- Ĉu mi iras ĉien, kien mi volas? - respondis Ludoviko.

De mia frua infaneco mi tamen memoras lin kiel maturaĝulon, bonegan aranĝiston de diversaj amuzoj, ekskursoj, dancoj k.t.p. Jen unu ekzemplo: ni ĉiuj pretigis nin al la dormo, nia patro preparis por la morgaŭo sian instruistan paperujon, sed subite ni - onkloj, pli aĝaj pensionanoj (nia patro havis pensionon por pli malpli 20 knaboj) kaj mi ekaŭdis muzikon kaj dancojn, aranĝitajn de nia Ludoviko (li loĝis malsupre en aparta ĉambro sur teretaĝo). Kaj mia patro, malgraŭ sia akurateco, malgraŭ la frua morgaŭa eliro al gimnazio, ne diris eĉ unu vorton kontraŭ la fantazio de sia Ludoviko ... Nur se anstataŭ Ludoviko estus mi!

Mi memoras unu kuriozan scenon tuj post mia eniro en la 1-an klason de la II-a gimnazio, kiam Ludoviko tiam estis en la oka. Petolemulo, mi enkuris en la instruistan kabineton kun ĉapelo sur la kapo. Oni tuj min senĉapeligis, forpreninte la profanigilon de la sanktejo. Plorante mi forkuris al Ludoviko. Li iris kun mi al inspektoro, kie prezentis min, sian fraton, novebakitan unuaklasulon. Sinjoro inspektoro ekridetis kaj, redonante al mi la ĉapelon, diris: - Memoru, knabo, ĉiam imiti vian fraton, kiu estas ornamo de nia gimnazio!" - Sur revojo mi timeme demandis la "ornamon", ĉu mi hodiaŭ restos sen tagmanĝo? - Ne, vi certe ricevos ĝin, ĉar neniuj ja scios pri la ĉapelepizodo."

V. Lorenz

Lingva angulo

A. Slanina

PREPOZICIOJ, post kiuj ne estas la akuzativo uzata

al	Mi venos al vl. Donu pacon al mi!
ĉe	Karlo estis vizite ĉe geonkloj. Arbo staras ĉe domo.
da	Kilogramo da pomoj. Kiom da tagoj vi estos en Londono?
de	Letero de amiko. Libro de Zamenhof.
dum	Dum la nokto oni dormas, dum la tago oni laboras.
el	Maria venas el urbo. Venis leteroj el Stokholmo.
ĝis	Mi akompanos vin ĝis la domo. De Prago ĝis Beogrado.
je	Mi ĉiam atendas je vi. Mi trinkas je via sano.
kun	Ĉu vi promenas kun mi? Li iras kun ŝi.
laŭ	Ni iros laŭ rivero Vltava. Laŭ ŝoseo kreskas arboj.
malgraŭ	Vi eliris malgraŭ mia malpermeso. Malgraŭ tio ŝi manĝis.
per	Per krajono oni skribas. Ili korespondas per Esperanto.
por	Mi venis por diri al vi, ke mi havas novan aŭtomobilon.
preter	En la strato preter nia domo promenas homoj.
pri	Karlo prelegas pri urbo Praha.
pro	Mi venis pro serioza afero. Pro muziko mi ne povas dormi.
sen	Li pasis preter ni sen saluto. Kafo sen sukero.
tra	La lumo iras tra la fenestro. Mi vidas vin tra vitro.

/ daurigota /

X-X-X-X-X

Kuiru internacie

Proksimiĝas Pasko, la festoj de reviviĝo de la naturo, do, la receptoj estos ovaj.

OVOJ BATITAJ /Francio/

4 ovoj	30 g da butero
2 supkuleroj da kremo	salo kaj pipro

Buterumu kvar ujetojn. Metu 1 ovon en ĉiun ujeton, salu kaj pipru kaj kovru per kremo. Aŭ baku ilin dum 10 ĝis 12 minutoj je malalta varmeco aŭ vaporkuiru ilin super kaserolo de varma akvo.

Varioj: Aldonu asparagajn pintojn al la ovoj.
Aldonu 1 supkuleron da hakitaj, kuiritaj agarikoj al ĉiu ovo.
Aldonu 1 supkuleron da hakitaj salikokoj al ĉiu ovo.

OVOJ BATMIKSITAJ KUN AGARIKOJ /Ĉeĥoslovakio/

4 ovoj	240 g da agarikoj, pecetigitaj
2 supkuleroj da lakto, salo kaj pipro	90 g da tomato, senŝeligita kaj pecetigita
45 g da butero	pinĉo da papriko
45 g da cepo, ronde tranĉita	

Fritetu la cepon en iomete de la butero, aldonu la agarikojn, tomatojn, paprikon, salon kaj pipron kaj fritetu ĝis moliĝo. Rompu la ovojn, miksu kun lakto ksj salo, batu bone. En alia fritilo fritu ilin ĝis firmiĝo. Metu la batmiksitajn ovojn sur la legoman miksaĵon.

OVO KAJ LARDO /Britujo/

1 ovo por ĉiu persono	1 ĝis 2 lardtranĉaĵoj por ĉiu persono
graso aŭ butero	

Senhaŭtigu la lardon. En fritilo varmigu iomete da graso aŭ butero kaj fritu kaj fritetu la lardon je ambaŭ flankoj. Elprenu la lardon kaj metu sur varman teleron. Rompu ĉiun ovon super taso por provi, ĉu freŝaj. Zorgeme metu la ovojn, unu post la alia en la varmegan grason en kiu la lardo estis fritita, ne difektu la ovoflavojn kaj fritetu. Kiam la ovo-blankoj firmetas, kovru la fritilon kaj fritetu ĝis la supraĵoj de ovo estas firmaj.

B o n a n a p e t i t o n !

X-X-X-X-X

Modo

VESTO FARAS HOMON!

La modo en vestado estas tiel malnova, kiel vesto mem; kaj certe Eva elektis plej belan figfolion por vesti sin!

Homo estas homo, sed la vesto ĝin karakterizas. (Mi uzas pronomon ĝi, ĉar homo estas kaj li kaj ŝi.) Ni faru provon: estas suna tago kaj ĉe la bordo de rivero sunumas sin homoj nur en banvestoj. Krom korpaj diferencoj ĉiuj estas egalaj, oni ne rekonas inter ili oficirojn, fer-vojistojn, policistojn, dandulojn, elegantulojn, simplulojn ... Nur vestoj - kaj uniformo - distingas homojn kaj karakterizas ilin. Aktoroj tion ĉi plej bone spertas en sia teatra profesio. Ĉu oni povus ludi reĝon, laboriston, soldaton, kamparanon, arbariston, almuzulon k.t.p. ne estante konforme vestitaj?

Kaj ni devas iom pensi pri samtempa modo. Ne la modo kulpas, sed tiuj, kiuj ĝin misuzas. Homon, kiu estas en societo (teatro, koncerto) solene, dece vestita, oni nomas snobo. Sed tia homo ne estas snobo. Snoboj estas tiuj, kiuj estas ne dece vestitaj, ĉar ili volas esti rimarkindaj. Ne

